

Numero: 292.
Septembro 2016.

24-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Eŭropo sen la angla lingvo

Kara Leganto, ĉu Vi povus imagi Eŭropon sen la angla lingvo? Kio okazus, se subite ĝi malaperus? Ĉu tiam la vivo haltus aŭ disfalus la tuta kontinento, kiel kartofortikaĵo?

Laŭ mi ne. Antaŭ jarcentoj la angla lingvo ne estis tiom forta, kiel nuntempe. Ĝin anstataŭis germana, franca, multloke la hispana kaj ni ne forgesiĝu pri la latina.

Ja ĝi estis la unusola komunikilo plurajn jarcentojn, sed ne nur en Eŭropo, eĉ en la tuta mondo. Komprenible tiam ankoraŭ ne ĉiu uzis ĝin, nur la pastroj, grandsinjoroj, kaj kleruloj.

Mi suspektas, se la angla lingvo malaperus, baldaŭe estus alia aspiranto kaj ĝi plenigus la vakan lokon.

Eble estus granda konkurso inter la lingvoj. Krom la menciitaj certe postulus antaŭecon la rusa. Ni ne fermu niajn okulojn, Eŭropon en la lastaj jaroj inundis, eĉ ankaŭ nun inundas Afrikaj kaj Aziaj popoloj parolante ĉefe la araban lingvon.

Eŭropo fariĝis vera Babelo. Eble pri tio skribis la Biblio.

Ni homoj denove konstruas gigantan turon nomatan Unuiĝanta Eŭropo.

Ni estus kapablaj superi ĉi tiun lingvan ĥaoson, se ni elektus helplingvon ne el la naciaj lingvoj, sed amase uzus Esperanton.

Mi scias, nun multas eksiblas kaj diras: stulteco. Min tre malĝojigas, kiam miaj konatuloj komencas pruvadi, la zamenhofa lingvo ne estas taŭga por tiaj celoj. Per ĝi oni ne povas esprimi sin. Super Esperanto forflugis la jaroj. Ĝi jam ne povas plenumi la postulojn de la dudekunua jarcento. D-ro Zamenhof kreis Esperanton fine de la 1800-aj jaroj.

Tamen ĝi ankoraŭ ekzistas kaj espereble ankaŭ en la estonto estos geesperantistoj, kiuj portos la torĉon lumigante la vojon por la homaro.


Vere mi ne scias, ĉu estus bone, ke ĝi fariĝus la komuna lingvo de Unio.

Laŭ mi, se la angla lingvo retropaŝos, ĝin anstataŭos aliaj naciaj lingvoj.

Kiu scias, kia estos Eŭropo pos kvin, dek, aŭ dudek jaroj? Ĉu ankoraŭ ekzistos Eŭropo?

Se ni rekonsciiĝos kaj ni eŭropanoj povos kontraŭstari la invadon de la migrantoj kaj el la ĥaoso povos naskiĝi nova, juna kontinento, tiam ankaŭ Esperanto fariĝos vera pontolingvo inter diverslingvaj popoloj.

-Redaktanto-



Cikonio ne bezonas helplingvon

Ĉiujare aŭtune la cikonio forflugas al Afriko, ĉar en Hungario ĝenerale la vintro estas frosta. Ĝi forlasas sian neston, kie ĝi naskiĝis kaj naskis idojn.

Ĝi devas flugi longe tra multaj landoj. Dum la flugo ĝi renkontiĝas kun diverslingvaj homoj. Tamen ĝi ne bezonas helplingvon. Ĝin oni komprenas ĉie, eĉ la homoj ĝojegas, kiam la cikonio flugas super ilia domo.

Ni homoj forlasante nian patrujon apenaŭ povas kompreni nin eksterlande.

Tio ĉi estas terura! Ni devas lerni diversajn lingvojn dum longaj jaroj, se ni deziras kontakti kun alilandaj homoj.

Ĉu cikonio estus pli saĝa ol la homo? Eble. La bestoj parolas ĉie la saman lingvon. Kial la homo estas punita?

Onidire nin la Sinjoro punis pro la Babela turo. La tiamaj homoj volis konstrui altegan turon, kiu atingas la ĉielon.

La Sinjoro koleriĝis kaj li intermiksitis nian lingvon. Ekde tiu ĉi tago ekzistas diversaj lingvoj sur la terglobo.

La cikonio simple nur vivas obeante al la leĝoj. Krom nesto ĝi konstruas nenion. Ĝi ne havas eksterordinaran sonĝon, eĉ krom la domokonstruo ĝi translokiĝas en ĉiu jaro suden kaj post monatoj ĝi denove reflugas por elkovi la ovojn.

Eble, se ni homoj kondutis tiel, tiam ankaŭ nia vivo estus pli facila.

Malgraŭ tio ni estu fieraj, ke ni havas sonĝojn. Ni kuraĝe revadu. Ni superu la multlingvecon kaj ni faru komunan helplingvon, per kiu ni povas kompreni nin ĉie.

Se tion ĉi ni komprenos, eble tiam ankaŭ la Sinjoro pardonos al ni kaj li helpos, ke tiu ĉi Babela turo konstruiĝu.

Ni volu tiun helplingvon per kiu ni povos komuniki kie ajn sur la terglobo.

Se ni posedus ĝin, tiam trapaŝante landlimojn, ni ne devos timi, ke ni ne povos ekparoli eksterlande kaj oni komprenos nin.

Bedaŭrinde rilate al cikonio, ni homoj ne povos ekzisti sen helplingvo.

Do, ni trovu la solvon! La tempo ege urĝigas nin.

-Ŝaŝa-



Poezio

Hodiaŭ mi subaŭskultis junulojn. Verdire ne estas bela afero iun kaŝe aŭskulti. Sed kion fari? Ili iris antaŭ mi kaj laŭte babiladis.

Komence mi ne atentis ilin. Min ili ne interesis. Iam ankaŭ mi estis junulo kaj mi paroladis kun miaj geamikoj pri diversaj temoj.

Je la vorto poemo mi eklevis mian kapon.

El ili iu knabo aplombe manifestis:

–Min tute ne interesas ĝi. Nun jam neniu legas versojn. Ankaŭ en la lernejo ĝi tedis min. Mi prefere rigardas akciajn filmojn per mia portebla komputilo. Nur stultuloj foliumas poemlibrojn.

Mi malgajiĝis. Ĉu vere mortis la poezio? Espereble ne.

.....

Theodor Storm, Fore

tradukita de Manfredo Ratislavo

La erikejo kuŝas en
la varma tagmezsunbrilo;
kaj ĉirkaŭ la ŝtontomboj jen
ruĝbrilo flugas tra l' trankvilo.

La herboj floras, la odor'
en la aeron ŝvebas sor.

Skaraboj hastas tra l' herbar'
en siaj bluaj kirasetoj,
pendigas sin la abelar'
ĉe l' de l' erik' sonoriletoj.
Svingiĝas birdoj tra l' aer' –
alaŭda kant' en la eter'.

Prilumigite de la sun'
kaduka staras jen kabano,
rigardas el la pordo nun
abelojn siajn kamparano;

kaj lia filo apud li
eltranĉas fluton jen por si.

Vibradon de l' tursonoril'
apenaŭ aŭdas la oldulo,
ekdormas li en la trankvil',
fermiĝas sonĝe la okulo.

- Ne venis la malkvietec'
de l' nova temp' al ĉi solec'.



Mikaelo Bronŝtejn

Mi povas sendi al vi neĝon,
Maltunan, lanugan,
Ĉielon puran, kiel preĝon,
Profundan, sennuban.
Fieras frosto kun obstino
Hieraŭ, hodiaŭ...
Ĉu vi ne aŭdas, amatino:
– Adiaŭ!

Mi povas sendi al vi sunon
El ora glacio.
Vintrego vartas mian nunon
Jam ekster konscio.
De la poluso venas vento
Kaj frapas la vitron.
Ne povas venki eĉ prudento
La vintron.

Kaj restas ĝojo ununura:
Sub vido envia
Ĉiele malaperas spuro
De l' bruo avia.
Ankoraŭ ion mi atendas...
En bluo malplena
Senmovo blanka sin etendas.
– Apenaŭ!..



Promeno en la aŭtuna arbaro



La viro ŝatis promeni en la arbaro. Precipe la aŭtuna ĉarmis lin. Tiam jam la birdoj estis silentaj, kvazaŭ ili sentus la proksimiĝantan vintron, kiam ĉion kovros blanka, mola neĝo kaj sur la branĉoj de arboj sidas frosto tintante siajn dentojn.

Li estis sola, eĉ nun lia hundo ne estis kun li.

La arbara silento samtempe estis trankviliga, sed ankaŭ timiga.

Li iris kaj iris. Liaj pensoj flugadis inter la arboj. Ankaŭ antaŭ jaroj li tiel promenis tie ĉi. Kun li estis bela knabino. Neniam li povas forgesi tiun admirandan tagon.

Ili promesadis unu al la alia, ke neniam finiĝos la amo. Ili eterne amos unu la alian.

Tion ili pensis serioze.

Se amo ennestiĝas en koron, oni blindiĝas. La koro ne obeas al la cerbo. Ĉio estas rozkolora kaj la animo ŝvebas en la blua ĉielo kaj la geamantojn estas malfacile surterenigi.

Nun promenante en la aŭtuna arbaro ĉio reviviĝis kaj li denove travivis tiujn minutojn.



La memoroj dolorigis lian koron. Li vane deziris liberiĝi de ili, li ne povis. La memoroj katenis lin al tiu iama promeno.

Ankaŭ tiam estis aŭtune. Same la sunradioj tralumis la kolorajn arbofoliojn.

Malgaje li pensis pri tiu tago.

Li ne sciis, kiel malboniĝis ilia kontakto. Komence ĉio iris glate.

Kie ŝi estas nun? – li pensis haltante ĉe maljuna kverko. La arbo estis alta kaj ĝi similis al saĝa maljunulo.

–Maljuna kverko, ĉu vi scias kio okazis? Diru al mi! Ja vi estas tre saĝa. Via saĝeco konata en la tuta arbaro. La etaj bestoj ĉiuj proponis, mi demandu vin!

Sed la kverko silentis. Pro la subita vento kelkaj flaviĝantaj arbofolioj falis surteren ĝuste al liaj piedoj.

La viro malĝoje suprenrigardis kaj rimarkis:

–Eble vi ne estas tiom saĝa, kiel diris la etaj bestoj. Ankaŭ vi estas nur arbo. Kompreneble mi ne koleras. Kial koleri? Arbo ne povas kompreni la malĝojon de homo. Ankaŭ por mi ĝi estas neklara. Ŝi trompis min. Ŝi diris, ke ĉiam ŝi amos min kaj ŝi neniam forlasos. Kie estas jam tiu belega aŭtuna tago, kiam mano en la mano ni promenadis tie ĉi. Almenaŭ vi povis diri kelkajn vortojn por konsoli min. Kial vi silentas? Tie ĉi ĉio silentas. Neniu povas klarigi al mi, kio okazis? Ĉu eble ankaŭ vi estas kontraŭ min? Sciu, mi amas la ĉi tieajn arbojn, arbustojn. Vi memorigas min pri ŝi. Kvazaŭ ankaŭ ŝi estus tie ĉi kun mi. Ho, dio mia, ŝiajn paŝojn imitas la vento kureganta super la arbaro. Diru al mi, kion fari? Kie ŝi estas nun? Mi tre amas ŝin ankoraŭ nun. Mi ne povas liberiĝi de ŝiaj memoroj. Arbaro helpu al mi reakiri ŝin! Mankas al mi ŝiaj ridetoj. Ne eblas, ke jam ŝi ne amas min. Mi petegas, ne silentu! Respondu al mi: ĉu ankoraŭ estas espero?

Pro la larmogutoj li apenaŭ vidis. Li ekiris ankoraŭ ĵetante lastan rigardon al la maljuna kverko.

Ĝiaj ankoraŭ pendantaj arbofolioj kvazaŭ susurus ion, sed li jam ne aŭdis.

Li ekiris hejmen, ĉar proksimiĝis la vespero. Aŭtune rapide vesperiĝas. Forflugis la varmaj someraj tagoj.

La viro plirapidigis siajn paŝojn kaj malaperis inter la densaj arbustoj.

Sciuro gaje komencis saltadi sur la branĉoj de arboj kaj ĝi ĝojegis, ke la viro foriris. La arbaro denove estas la ilia.

-Apáti Kovács Béla-



Por infanoj



Peĉjo iras al lernejo



Forpasis la somero kaj alvenis la septembro, la komenco de la nova lernojaro.

Peĉjo fariĝis granda knabo. Ankaŭ li iris al lernejo kun la aliaj gelernantoj.

La knabeto prepariĝis jam antaŭ semajnoj al tiu eksterordinara evento.

Ili aĉetis tornistran por la lernolibroj kaj lerniloj. Ĝin li montris al ĉiu en la domo kaj fiere diradis:

–Mi iros al la lernejo. Rigardu kiom belega estas mia lerneja tornistro! En septembro mi iros al la lernejo.

La domanoj ridetis kaj ĉiu interesiĝante rigardis la trezoron.

Por Peĉjo ne sufiĉis, ke nur homoj rigardas ĝin. Li iris al la birdokorto. Tie la kokinoj mire rigardis lin.

–Kion vi deziras Peĉjo? – demandis la koko.

–Rigardu, kiom belegan lernejan tornistran mi havas!

–Ĝi estas beleta – diris la koko. – Kio estas en ĝi?

–Ankoraŭ nenio. Kiam mi iros al la lernejo la unuan de septembro mi ricevos lernolibrojn. Mi apenaŭ atendas la unuan lernotagon.

–Ĉu vi lernos tie? Kiujn lernobjektojn vi lernos?

–Matematikon, legadon, skribadon. Mia patrino diris, en la lernejo ni povos desegni kaj kanti.

–Ĉu vi ne gimnastikos? – demandis surprizante la koko. – Ni gimnastikas ĉi tie en la birdokorto ĉiutage.

–Kompreneble ankaŭ ni gimnastikos. Mia pli aĝa frato diris, la lernejo havas grandan gimnastikejon, kie la gelernantoj povas gimnastiki.

–Mi envias vin, Peĉjo – diris la maljuna viransero.
– Bedaŭrinde mi neniam vizitis lernejon. Vere mia panjo instruis kalkuli al mi. Mi scipovas adicii la sekvan: du plus du anseropiedoj estas kvar. Ĉu ne?



La koko kapjesis.

–Vi pravas mia amiko viransero, vi estas saĝa besto. Kiel vi pensas, se ankaŭ mi vizitus lernejon, tiam mi scius kalkuli?

–Jes – kuraĝigis ĝin la meleagro – sed kortobirdo ne povas viziti lernejon. Ne revadu, koko!

–Mi tre ŝatus viziti lernejon – obstinis la koko. – Mi volas lerni. Peĉjo, bonvolu helpi al mi!

–Kiel mi povus helpi? – demandis la knabeto.

La respondo neniu kortobirdo sciis. Bonŝance la fidela domgardanto, la hundo Bodri ekaŭdis ilian paroladon kaj pigre iris al ili.

–Mi scias la solvon.

–Ĉu vi scias? – miris la bestoj.

–Jes mi scias. Peĉjo instruos vin alveninte hejmen.

–Bonega ideo – ĝojegis la kortobirdoj. Ĉefe la koko ĝojegis kaj ĝi turnis sin al la knabeto.

–Ĉu vi instruos min?

–Kial ne – li diris gaje. – Almenaŭ mi ekzercos dume la lernitan lecionon.

–Mi dankegas – diris la koko – sed mi petas vin, ne forgesiĝu pri via promeso.

Peĉjo devis iri, ĉar lia patrino vokis lin.

–Mi ne forgesos – li respondis kaj li eniris la domon.

-Onklo Adalberto-



HUMURO

Aŭtomobilisto radumas po cent kilometroj hore, trafas kaj retrovas sin, iom zigzagite antaŭ Sankta Petro, kiu demandas: „Kion vi deziras? Kaj la alia, kun sovaĝa mieno: „Alkonduku Sanktan Kristoforon, ke mi diru al li mian opinion!”

*



*

Usona psikiatro esploras rekrutojn. Petinte ilin pri memkolektiĝado, li tiras el sia poŝo sian poŝtukon kaj swingas ĝin antaŭ iliaj okuloj; li reŝovas ĝin en la poŝon, kaj laŭvice pridemandas: "Pri kio vi ekpensis?" La unuaj respondoj estas banalaj: pri neĝo, pri papero, ktp. Sed unu deklaras: "Pri amorado! -- Treege interesa, ekkrias la psikiatro. Kaj kial vi ekpensis tion? -- Nu, mi ĉiam pensadas nur pri tio..."

*

Loĝanto de Rio, revenante el longa vojaĝo, jam ĉe la haveno renkontas amikon: "Mia edzino ne scias, ke mi alvenis. Mi iras tuj surprizi ŝin... -- Kun kiu?"

HUMURO

Nenormala.

Kampanano el Mato Grosso finfine decidiĝas veturi al la granda urbo, konsulti kuraciston. "Nu, kion vi sentas, amiko? -- Ha, sinjoro, jam de jaroj mi suferas je maldormemo. -- De jaroj, ĉu eble? -- Jes ja! Kiom ajn mi penas, ĉiun duan aŭ trian tagon, mi vekigigas."

*



*

"Paĉjo, paĉjo, kie troviĝas la piramidoj?"
"Demandu ĝin de panjo, hejmon ŝi mastrumas!"

*

